

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

DEPUTITOJ —
ESPERANTISTOJ

•
KOMPUTER —
INSTRUADO

•
BULGARO —
AKADEMIANO

•
JUBILEO DE IPTEA


•
ESPERANTO EN
RAZGRAD

•
KARA GASTO
EL BELGIO

•
NIA INTERVJUO

•
ENLANDA
MOVADO

•
DISTROJ



JARO 55 • N-RO 8 • AŬGUSTO • 86

DEPUTITOJ — AMIKOJ DE ESPERANTO

La balotoj por Naŭa Parlamento, por komunumaj konsilantaroj, urbestroj kaj asesoroj en Popola Respubliko Bulgario je la 8-a de junio 1986 prezentis tutpopolan feston.

Jam de frumateno en la balotejojn de la tuta lando venis miloj da civitanoj por esprimi sian volon pri feliĉa estonto de nia lando, pri paca krea laboro, por komisii al la elektitoj gravajn taskojn, plenumendajn dum ilia mandato.

Dum la tuta tago la kandidatoj por parlamentanoj, komunumaj konsilantoj kaj urbestroj — unuj el la plej dignaj gefiloj de socialisma Bulgario — estis inter siaj balotantoj, konversaciis amike kun ĉiuj, kiuj volis esprimi bondezirojn aŭ proponojn pri konkretaj faroj en la estonteco. Aparte korvarme estis renkontitaj la partiaj kaj ŝtataj gvidantoj, kiuj venis plenumi sian civitanan devon.

Klara, konkreta kaj celdirektita estas la politika platformo, por kies realigo balotis kaj esprimis sian volon la balotintoj. Tio estas la decidoj de la XIII Kongreso de la Partio, la gravaj taskoj, kiujn ĝi starigis antaŭ la tuta bulgara popolo por plua intensa ekonomia, sociala kaj kultura disvolviĝo de Bulgario ĝis 1990 jaro kaj ĝis la fino de la jarcento.

Ĉie la balotado pasis ĉe vigla politika aktiveco kaj en festa etoso. Oni balotis ĉe strikta konsidero de la Konstitucio kaj de la Balotleĝo de PR Bulgario. La balotkomisionoj certigis kondiĉojn por flua kaj organizita balotado garantiante la sekretecon de balotado.

La enskribitaj en la listoj voĉdonantoj balotis preskaŭ centprocente. Tio ja estas vera manifestiĝo de popola demokratio kaj unueco, plena solidareco kun la politiko de Bulgara Komunista Partio kaj de la popola registaro por la bono de la bulgara popolo, por plua disvolviĝo de la socialisma konstruado en nuntempa Bulgario.

Inter la elektitaj reprezentantoj de la popolo estas ankaŭ multaj esperantistoj, kiuj per sia sindona laboro kaj socia aktivado en siaj loĝlokoj estas imitinda modelo de entuziasmaj konstruantoj de la socialisma socio. En la vivoj de la parlamentanoj estas ankaŭ elstaraj partiaj kaj ŝtataj gvidantoj.

La redakcio de „BE“ salutas la novelektitajn kaj estintajn ankaŭ en la pasinta periodo parlamentanojn kaj esperas, ke ili diversforme daŭre subtenados la bulgaran Esperanto-movadon!

Fruktodonan laboron!



Partoprenintoj en la jarkonferenco de la Ĵurnalista Sekcio ĉe BEA, okazinta la 17-an de majo 1986 en Sofio



ESPERANTO EN LA EPOKO DE LA KOMPUTERINSTRUADO

En julio-aŭgusto 1985 en urbo Norfolk, Usono, okazis la IV Internacia Konferenco pri Uzado de Komputeroj en la Klerigsistemo, organizita de la Internacia Federacio pri Informesplorado (IFIP)¹. Dum tiu konferenco la plej signifa novaĵo estis la demonstrado de personaj komputeroj, kiuj „parolas“ per homa voĉo kaj povas esti uzataj kiel altefika rimedo en instruado ĝenerale kaj speciale en fremdlingva instruado.

Dank' al tiu granda kaj principe nova atingo de la informteknologio estiĝas ebla individua lingvoinstruado en formo de dialogo inter homo kaj persona komputero.

Diference de la klasikaj metodoj, ĉe kiuj la instruato pli multe aŭskultas ol parolas, ĉe lingvoinstruado pere de komputero ĉiu paŝo de la instruato estas ligita kun konstruado de esprimoj. Tio ĉi ĝenerale ŝanĝas la instruprocezon. La enkondukataj dum la leciono novaj vortoj estas aktive kaj multfoje ripetataj per ludado, antaŭ ol la instruato transiras al la sekva temo. Tiamaniere la vortoj kaj la esprimoj ligiĝas inter si laŭsence per multnombraj ligoj, konstruas sistemon por senpera parolreago kaj estiĝas „intelektala propraĵo“ de la instruato. Tio kio estas jam adoptita povas esti intuicie uzata en diversaj cirkonstancoj, ĉar ĝi estas bonege stabiligita kaj kvalite, kaj rilate ties longuzeblecon.

Dum la proceso de sistema formado de lingvaj kutimoj ĉe ĉiu aparta lernanto, neniu instruisto povus montri similan paciencon en daŭro de tutaj horoj, kiel tion ĉi faras la komputero. Kaj ankoraŭ pli grava estas la fakto, ke la nuntempa teknologio povas garantii al ĉiu instruato apartan malseveran kaj paciencon „in-

struiston“, kiu konstante adaptas la gradon de malfacileco al ties individuaj ebloj.

Estas necese menciigi ankaŭ la fakton, ke en la lastaj jaroj pli kaj pli grandajn eblecojn montras la sistemoj, kunligantaj la avantaĝojn de la komputeroj kaj la vidodiskaj instalaĵoj. Tio estas la t. n. „interaktaj vidosistemoj“. Ĉe ili la instruato povas ricevi sur la komputerekrano krom la tekston, ankaŭ diversajn bildojn kaj epizodojn (vidomagnetofonajn); li respondas al demandoj, partoprenas en dialogo kun la herooj sur la ekrano kaj konstruas frazojn. La ilustraĵoj, kiujn la komputero povas eltiri el la kompakta vidodisko kaj prezenti ilin sur la ekrano paralele kun la teksto kaj la viva parolado havas ekskluzive favoran efikon por konstruo de la lingva pensobazo.

Sur la fono de la menciitaj eblecoj per lingvoinstruado, kiujn proponas la novaj informaj teknologioj, nun aparte favoran lokon okupas la internacia lingvo Esperanto. Ĝia lernado helpe de persona komputero, diference de aliaj lingvoj, povas realiĝi en tre mallonga tempo. Tion permesas ĝia gramatika taŭgeco por komputerinstruado. Oni povas aserti, ke jam ekzistas kondiĉoj por amasa disvastigo de Esperanto, paralele kun la pli kaj pli amasa uzado de komputeroj en fremdlingva instruado.

Sekve oni devas konsideri Esperanton ne nur kiel helplingvon por internacia komunikado, sed ankaŭ kiel helplingvon por alproprigo de fremdaj lingvoj. La lernado de Esperanto en la infanaĝo, precipe se tio estas en formo de ludado per komputero, povas estiĝi plezuro, distro. Konsiderante la emon de infanoj al aktiva partopreno, al respondo, al E-instruado jam en la elementa lernejo povas esti organizita kiel lu-

dado, kiel turniro pro kia simpleco, belsoneco kaj logikeco.

Tiamaniere Esperanto povas estiĝi ponto al alproprigo de fremdaj lingvoj. Kreskantoj konstruos iun elegantan intuician imagon pri la mekanismo de ideoesprimado laŭ maniero diferenca de tiu proponata de la gepatra lingvo. Tiel ili estos pretaj por la malfacilaĵoj, kiujn proponas la fremdaj lingvoj, kun ties multnombraj gramatikaj esceptoj kaj malsimpla frazeologio.

Surbaze de la menciitaj faktoj kaj konsideroj oni povas konkludi, ke necesas intensa laboro por organizi perkomputeran E-kursen. Sekve oni devas iom post iom enkondukadi modernajn sistemojn kun eblecoj alproprigi kaj sintezi la parolon, ankaŭ vidosistemojn por ilustrado de la instruproceto pere de aktiva komputerezado.

Lige kun la 100-jariĝo de Esperanto oni povus proponi al UNESKO longdaŭran projekton,

kunlabore kun UEA, rilatantan la E-instruadon (foje semajne po unu instruhoro, en elementa kaj baza lernejo, per uzado de nuntempaj informteknologioj, kiuj nun rapide disvastiĝas en la klerigsistemo). Povas esti proponita ankaŭ utiligo de televidkomunikaj sputnikoj (same kunlabore kun UNESKO), por elsendado de televidprogramoj en Esperanto kun celo instrui kaj propagandi la internacian lingvon Esperanto kaj interŝanĝi informojn en la sfero de scienco kaj kulturo.

Sendube la nuntempa evoluo de la komunikiloj estas ege grava por la disvastigo de Esperanto, por egalrajta komunikado inter la popoloj kaj por estigo de pli etika mondo.

Bojan LALOV

La aŭtoro de la ĉi-supra artikolo faris ĉefprelegon en la sekcio „Fundamentaj problemoj de komputeringstruado“.

ABONU „BULGARAN ESPERANTISTON“!

KARAJ LEGANTOJ,
LA ABONKAMPANIO POR 1987 JAM KOMENCIGIS!
NE PROKRASTU! ABONU REVUON

„BULGARA ESPERANTISTO“

MONATA ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

„BULGARA ESPERANTISTO“ ESTAS GNU EL LA PLEJ MALNOVAJ E-REVUOJ EN LA MONDO — FONDITA EN 1919

„BULGARA ESPERANTISTO“ TRAKTAS AKTUALAJN PROBLEMOJN DE LA E-MOVADO EN BULGARIO KAJ EN ALIAJ LANDOJ

„BULGARA ESPERANTISTO“ ESTAS LIBERA TRIBUNO DE LA LEGANTOJ

„BULGARA ESPERANTISTO“ DISPONIGAS AL VI INTERESAJN ORIGINALE VERKITAĴN EN ESPERANTO AŬ TRADUKITAĴN LITERATURAJN VERKOJN DE BULGARAJ KAJ FREMDAJ AŬTOROJ

Jarabono: por Bulgario — 2,90 lv.

por socialismaj landoj — 5,42 lv.

por ĉiuj ceteraj landoj — 5,90 lv. (aŭ egalvaloro en nacia valuto)

ABONU TŬJ PERE DE R E P!

ABONIGU ANKAŬ VIAJN EKSTERLANDAJN AMIKOJN! LA PLEJ BELA DONACO POR ILI ESTOS JARABONO DE „BULGARA ESPERANTISTO“ POR 1987!

ALILANDAJ LEGANTOJ POVAS ABONI LA REVUON ĈE LA CENTRA OFICEJO DE UEA — Nieuwe Binnenweg 176, 3015 — BJ Rotterdam, Nederlando

NE FORGESU! NUN PLEJ GRAVA TASKO DE ĈIU E-SOCIETO, DE ĈIU E-AKTIVULO ESTAS NEPRE PLENUMI LA DECIDON DE LA 41-A KONGRESO DE B E A: ĈIU ESPERANTISTO — ABONANTO DE „BULGARA ESPERANTISTO“!

HONORE AL LA 100-JARIĜO DE ESPERANTO — VARBU PLIAJN NOVAJN ABONANTOJN DE „BULGARA ESPERANTISTO“, EN BULGARIO KAJ EKSTERLANDE!

LASTA LIMDATO — 1-A DE DECEMBRO 1986

ATENTU! LA ELDONKVANTO ESTAS LIMIGITA!

LA REDAKCIO



KIO ESTAS LA GUSTA NOMO DE LA PLANLINGVO DE D-RO ZAMENHOF?

BERNARD GOLDEN

Lastatempe estigis demando pri la ĝusta aŭ oficiala nomo de lingvo vaste konata dum jardekoj kiel Esperanto. La demando estas respondebla, aŭ almenaŭ serioze pritraktebla, nur en historia perspektivo. Estas necese rigardi la problemon laŭ du vidpunktoj: (1) tiu de la aŭtoro de la lingvo; (2) tiu de la uzantoj kaj ankaŭ neuzantoj, kiuj parolas kaj skribas pri la lingvo. La unua paŝo estas dokumenti la Zamenhofan nomenklaturon surbaze de liaj propraj verkoj kaj publikaĵoj.

1. **Lingwe universala.** Tiu ĉi nomo datiĝas de la jaro 1878, kiam en la monato decembro la 19-jara gimnaziano debutigis sian unuan praesperantan lingvon. La litero *w* en tiu nomo estas prononcata kiel „v”. El tiu lingvo universala restis hodiaŭ nur kvarlinia poemo.

2. **Lingvo universala.** Post mallonga restado ĉe la Universitato de Moskvo, Zamenhof revenis al Varsovio kaj, trovinte detruitaj la manuskriptojn pri **lingwe universala**, li komencis reverki sian lingvon en la periodo 1881–1882. La titolo de la dua praesperanta manuskripto, de kiu ni havas kopion, tekstas: **Lingvo universala f. e. grammatiko e verbo laul trema ridakco del anno 1881** (Lingvo universala t. e. grammatiko kaj vortaro laŭ la lasta redakto de la jaro 1881). Rimarku, ke en la kolekto da tekstoj en praesperanto ne troviĝas la vorto „internacia”.

3. **Lingvo internacia.** La esprimo „lingvo internacia” aperas la unuan fojon okaze de publikigo de la t. n. Unua Libro, unue en la rusa teksto kaj poste en aliaj tradukaĵoj. La Esperanta versio de la titolpaĝo de la rusa eldono enhavas la vortojn „internacia lingvo” laŭ la rusa ordo. En aliaj lingvoj la etnolingvaj titoloj estas ekvivalentaj al „lingvo internacia” (en la pola kaj franca) kaj al „internacia lingvo” („en la germana, angla kaj sveda). Estas du esceptoj; la unua angla versio (1888) estis nomata **international tongue** (**tongue** = „lingvo” kaj „lango”) kaj la juda traduko (1889) havas la vorton **Weltŝprache** (mondlingvo). Kvankam la vorto „universala” ne aperas en iu titolo, ĝi estas uzata en la titolpaĝa devizo „por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia”. Nur la angla traduko havas esprimon identan kun la titolo de la libro, **international tongue**; en la aliaj lingvoj la adjektivo uzata en la devizo ne estas la sama kiel tiu de la titolo. La signifo estas aŭ „mondlingvo” aŭ „universala lingvo”!

4. **Esperanto.** Ĉiuj Unuaj Libroj havis kiel la nomon de la aŭtoro la pseŭdonimon „D-ro Esperanto”. En **Nomaro de l' verkoj pri la lingvo internacia (Esperanta)**, kiu eliris ĝis Januaro 1889 la vorto „Esperanta” estas uzata interkrampe kun la esprimo „lingvo internacia”. En postaj Nomaroj la adjektivo „Esperanta” aperas sen krampoj, kaj post kelkaj librotitoloj la vortoj „verkita en la lingvo Esperanto” anstataŭas

„internacie”. Ankaŭ en 1889 estis eldonita la unua publikaĵo, en kies titolo aperas „Esperanto” kiel lingvonomo. La rusa titolo tekstas: **Полный словарь эсперантского (международного) языка**. Ĉast’ ruskoo-esperantskaja. Tie ĉi inter krampoj estas la rusa vorto signifanta „internacia”. Rimarku, ke en la subtitolo en Esperanto **Plena vortaro rusa-internacia**, „internacia” estas uzata anstataŭ „Esperanta”. La nomo de la aŭtoro ankoraŭ estas d-ro Esperanto. En aliaj libroj eldonitaj en la sama jaro, la vera nomo de la aŭtoro aperas kiel la eldonisto, literita Zamengof laŭ la Kirila alfabeto. Samenhof laŭ la germana ortografio aŭ fonetike kiel Zamenhof. La titolo de la Esperanta-germana meza vortaro estas **Wörterbuch der internationalen Esperanto-Sprache, international-deutscher Teil**. Nun „Esperanto” rolas kiel substantivo. Simila titolo estas **Antaŭparolo al la vortaro de la lingvo „Esperanto”**. Akordas ankaŭ la rusa subtitolo, en kiu estas **язык „Esperanto”**. Ankoraŭ unu ekzemplo estas la titolo de la unua adresaro (1889): **Адресаро де ла персонор, киуј лернис ла лингвор „Esperanto”**. Sur la titolpaĝo estas ankaŭ la rusaj vortoj **язык „Esperanto”**. Ŝajnas, do, ke en 1889 Zamenhof ekuzis „Esperanto” kiel la nomon de sia planlingvo.


5. **Universala lingvo.** Pro iu nekonata kialo, la esprimo „universala lingvo” denove aperas en librotitoloj. En 1890 Zamenhof eldonis **Vsemirni jazik Esperanto** (Universala (aŭ tutmonda) lingvo Esperanto). Geoghegan tradukis ĝin anglan kiel **The Universal Language Esperanto**, la dua eldono de la franca traduko farita de L. de Beaufront titoliĝas **Langue Universelle esperanto**, kaj la portugala versio de J. H. Ferreira nomiĝas **A lingua universal „Esperanto”**.

En 1893 Zamenhof denove uzis la terminon „internacia lingvo” en kelkaj titoloj, sed en postaj jaroj „Esperanto” kiel memstara lingvonomo dominis.

„Internacia lingvo” (aŭ „lingvo internacia”) neniel povas esti agnoskita kiel la oficiala nomo de la lingvo de Zamenhof. Krom la verkoj de Zamenhof, mi ekzamenis plurdekojn da titoloj de aliaj publikaĵoj pri la planlingvistiko kaj mi trovis, ke „universala lingvo” kaj „internacia lingvo” estis uzataj sinonime en la 19-a jc. kaj ankaŭ hodiaŭ. Jen okulfrapa ekzemplo. Kiam Louis Couturat kaj Léopold Leau eldonis sian unuan historion de planlingvoj en 1903, ili titolis la libron **Histoire de la Langue Universelle**. Kvar jarojn poste ĝia suplemento havis la nomon **Les Nouvelles Langues Internationales**. Ne estas eble klarigi, kiel okazis la ŝanĝo de „universala” al „internacia”. Se oni komparas germanlingvajn titolojn, oni trovas, ke la preferata termino estas **Weltsprache** (mondlingvo). Plej verŝajne la elekto de termino dependas de kapricoj de aŭtoroj kaj eldonistoj.

„Esperanto”, do, estas la sola konvena nomo por la planlingvo de d-ro Zamenhof. La kialoj estas la sekvaj: (1) ĝi estas mallonga kaj pli facile pluformebla ol „internacia lingvo”; (2) ĝi estas neambigua, do malhelpas konfuzon kun aliaj internaciaj lingvoj; (3) ĝi antaŭ longe firme enradikiĝis pro la tradicia uzo de la aŭtoro mem kaj la uzantoj de la lingvo; (4) pro sia signifo ĝi karakterizas la personecon de d-ro Zamenhof kaj la spiriton de la Esperanto-movado. La nomoj de aliaj planlingvoj odoras je mucideco, sekeco, senviveco: Volapuko, Ido, Occidental, kaj ankaŭ la plej freŝe bakitaj, Anglo-Lat, Romanid, Vikto. Kontraŭe, malantaŭ la poezie elvokiva nomo Esperanto staras vivantaj, agantaj kaj pensantaj homoj. Ĝi, do, estas unika fenomeno, kaj pro tio mi opinias, ke estas konsilinde kontraŭstari al provoj anstataŭigi la nomon Esperanto per klasifika termino kiel „internacia lingvo” aŭ eĉ pli riproĉinde per frida mallongigo — I. L. — aŭ enigma siglo — ILo.

LA KVARA BULGARO — AKADEMIANO



En majo ĉi-jara nin atingis agrabla novaĵo. La elstara bulgara esperantisto, ĉefredaktoro de revuo „Paco“ Violin Oljanov estis elektita membro de la Akademio de Esperanto.

Tiu elekto ne venis hazarde — ĝi havas sian multjaran antaŭhistorion. La 67-jara bulgaro dediĉis al Esperanto 53 jarojn de sia konscia vivo. Ekde 1956 V. Oljanov laboras en la kampo de esperantologio kaj interlingvistiko. Li verkis proksimume 60 studojn kaj esplorojn pri diversaj lingvaj problemoj, 12 el ili aperis kiel apartaj libroj. Mi mencias nur kelkajn el ili: „Bulgara-Esperanta Vortaro“, „Esperanta gramatiko“, „Malfacilaĵoj en la facila Esperanto“, „Postkursaj legaĵoj“, lernolibrojn, serion da metodikaj artikoloj kaj laste la solidan volumon „Interlingvistiko-Esperantologio“, kiu altiris la atenton de la mondaj esperantologoj.

Per interesaj prelegoj Oljanov partoprenis internaciajn lingvistikajn forumojn. Ekde 1980 li estas konsultato de la lingvo-servo ĉe UEA.

La elekton de la nova akademiano proponis ok membroj de la Akademio (la regularo postulas minimume kvin). Oljanov ensia nova funkcio kontribuos al la Gramatika Sekcio.

Violin Oljanov estas la kvara bulgaro — membro de la Akademio de Esperanto. Ĝis nun kiel akademianoj estis elektataj Ivan Krâstanov, Atanas Atanasov — ADA kaj prof. d-ro Stojan Ĝuĝev — nuna vicprezidanto de la Akademio de Esperanto.

La Akademio havas 45 membrojn — famaj esperantologoj, reprezentantoj de diversaj lingvoj. Tiu sendependa lingva institucio celas observi kaj reguligi la disvolviĝon de la Internacia Lingvo. Dum la Unua Universala Esperanto-Kongreso en 1905, laŭ la propono de d-ro L. L. Zamenhof estis fondita Lingva Komitato de la Esperanto-movado, kiu dum la sekvaj jaroj transformiĝis en Akademion de Esperanto. En tiu komitato membris ankaŭ la bulgaro Georgi Oreŝkov.

Al la nova bulgara akademiano ni bondeziras fortan sanon kaj multajn sukcesojn sur la vasta kampo de esperantologio kaj interlingvistiko! Sincerajn gratulojn!

Maria JANKOVA

Jubileo de IPTEA

La Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio (IPTEA) fariĝas 20-jara. Ĝi estis fondita dum la 51-a Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝto (1966) laŭ iniciato de nia veterano, Esperanto-poeto kaj verkisto, ekspoŝtestro — Asen Grigorov.

La fandan fakkuŭvenon partoprenis 14 delegitoj el Bulgario, Germana Demokratia Respubliko, Finnlando, Francio, Hungario, Pollando, Rumanio, Sovetunio kaj Ĉeĥoslovakio. La kunveno elektis kiel unuan prezidanton de IPTEA — Asen Grigorov kaj kiel sidejon de la asocio — nian ĉefurbon Sofio.

Baldaŭ poste la estraro de IPTEA eniris en korespondligoj kun UEA kaj kun aliaj fakasocioj kaj naciaj Esperanto-asocioj kaj Internaciaj PTT-organizaĵoj kiel Internacia Poŝtista Unuiĝo (UPU) kaj Internacia Unuiĝo de Telekomunikado (ITU), kiun multe helpis IPTEA konfirmiĝi en Esperanto medioj kaj en internaciaj PTT-sferoj.

Estis fonditaj ankaŭ IPTEA sekcioj kaj rondoj en diversaj landoj. Al 1969 komencis funkcii sekcioj de IPTEA en Bulgario, Finnlando, Francio, Hungario, Italio kaj Svedio. Pli malfrue estis fonditaj tiaj en FR Germanio kaj PTT-grupoj (rondoj) en Belgio, Nederlando, Jugoslavio, Japanio ktp.

Depost sia fondiĝo IPTEA eldonas ĝian presorganon „Interligilo“, kiu nun aperas 4-foje dum la jaro, en eldokvanto de 750 ekzempleroj.

La jaro 1986 estas jubilea ne nur por IPTEA, sed ankaŭ por ĝia organo „Interligilo“, kies 100-a numero ĵus aperis.

Dum sia 20-jara ekzistado IPTEA aranĝis 16 internaciajn ĉefkunvenojn — la pliparto de ili enkadre de Universala Esperanto-Kongreso.

Draguŝko PETROV

Tero de Ludogorie



La horloĝturo de lernejo „Vasil Levski“.

Foto: Evelin Zagorov

Rakonti pri ĝi ne estas facile — ne eblas kapti ĝin, kiel birdon, en momento de senmoveco. Tie ĉi ĉio estas movado, kiu senĉese modelas la novan aspekton de nia naska landregiono.

Riĉa estas la historio de Ludogorie! De plej malproksima antikveco tie floris rimarkinda materiala kaj spirita kulturo. Proksime de Razgrad troviĝas postsignoj de la plej frua periodo de l'homa evoluo — de la malnovŝtona epoko: ĉirkaŭ 100 loĝlokaj atlaĵoj el la periodo de la novŝtona kaj ŝtonkupra epoko; pli ol 600 tracaj tombomontetoj; la ruinoj de la romia urbo Abritus, kie estis trovita la plej granda ora monereztrezoro en Bulgario. . . Ĉirkaŭ 1200 nemoveblaj kulturmonumentoj. Dum la lastaj jaroj apud vilaĝo Sveštari estis elfosita traca tombomonteto de IV jc a. n. e., konata sub la nomo „Monteto de Gina“ — surtomba konstruaĵo de traca aristokrato, unika per siaj interna arkitekturo kaj bareliefoj.

La historiaj informoj pri la apero de Razgrad estas tre malabundaj. Dum la Dua bulgara regno ĝi ekzistas kiel mezepoka loĝloko. Dum la XVI jc — evoluas kiel komerca centro. La urbo havas rimarkindan progreson en la periodo de la nacia Renaskiĝo kaj en la jaroj de kapitalismo ĝi estas komerca-metiista kaj agrikultura centro kun malnovaj tradicioj en la kultura vivo. Tie laboras akad. Anani Javašov, kreinta en 1887 muzean kolekton; la pentristoj Dragan Danailov kaj Ilia Petrov; la muzikagantoj Dimităr Nenov kaj Vladi Simeonov; funkcias kelkaj legosocietoj, la urba horo „Jelezni struni“ („Feraĵ Kordoĵ“), simfonia orkestro. . .

Post la venko de la socialisma revolucio en 1944, sub la konstantaj zorgoj de la partio kaj la popola ŝtato, Ludogorie transformiĝis en florantan angulon de nia socialisma patrolando, kun administra centro urbo Razgrad, kie funkcias kelkaj grandaj industriaj entreprenoj: Scienc-Esplora Instituto pri Antibiotikoj, uzino por produktado de vitro kaj porcelano „Djanko Stefanov“ k. a.

En vilaĝo Topĉii estas aranĝita muzea kolekto „Etnografia Komplekso „Kapanci“, en vilaĝo Pobit Kamāk — muzea kolekto de la enmigrintoj el Balkanmontaro.

Turistaj itineroj kondukas al la loko „Sborjanovo“ kun multaj tracaj tombomontetoj, al la arkeologia rezervejo „Abritus“, al la Distrikta Historia Muzeo en Razgrad, al belartaj galerioj k. a.

Centro de nova Ludogorie, estas la bela socialisma urbo Razgrad, kiu impete direktiĝis al sia komunisma estonto.

Milena GEORGIEVA

¹⁾Ludogorie — vasta ondoforma montplataĵo en Nord-orienta Bulgario, parto de la Danuba Montetoriĉa Ebenaĵo — Not. de Red.

Esperigaj atingoj

Pri la sukcesoj de la E-movado en urbo Razgrad kaj en la distrikto hodiaŭ oni povas paroli kun fiero.

La esperantistoj en Razgrad-distrikto vivas aktivan organizan vivon. Ili partoprenas naciajn kaj internaciajn konkursojn, internaciajn kongresojn k. a., kaj laŭ siaj ebloj disfamiĝas tra la mondo la sukcesojn de nuna Ludogorie.

La intereso al Esperanto en Razgrad-distrikto ekĝermis en la komenco de nia jarcento. Jam en 1905 nia samurbano Stefan Minkov (1883—1982), partoprenis la unuan Esperanto-kongreson en Bulon-sur-Mer, Francio. Kun aparta fiero li rakontadis pri sia interparolo dum la kongreso kun la aŭtoro de Esperanto d-ro L. L. Zamenhof.

Pli malfrue, en 1922, en Razgrad kaj en vilaĝo Uŝinci oni organizas kursojn de Esperanto, kunvenojn, abonas E-literaturon, gazetojn, jurnalajn. . . En la urbo estis ankaŭ vigla junulara E-movado. Tiutempe aperas artikoloj de esperantistoj el Razgrad. Dimităr Panov el Uŝinci, instruisto en Razgrad, publikigas la artikolon „Al kiu servas Esperanto“.

En la periodo 1928—1930 Esperanto penetras en la gimnazion de Razgrad. Jordan Conev, tiama instruisto en la gimnazio, aranĝis kursojn kaj preparis multajn esperantistojn.

En la periodo 1935—1938 la instruisto Ivan Andreev kaj aliaj kursgvidantoj organizas en la urbo kursojn por civitanoj.

Dum la periodo de la Dua Mondmilito (1939—1944) la movado stagnas. Esperanton lernas nur apartaj personoj, memstare — iuj en koncentrejoj (Petăr Kovlev k. a.) kaj malliberejoj.

Post la Naŭa de Septembro 1944 en nia distrikto, same kiel en la tuta lando, la E-movado rapide ekprogresas.

En 1957 la E-movado en la urbo reviviĝas. Estas organizitaj kursoj por instruado de Esperanto, kun lektoro la esperantisto-entuziasmo Aleko Karamilov (Kasimov) el vilaĝo Sveštari. Dum la sekvanta 1958 la esperantistoj Petăr Nedelĉev Marinov, Dimo N. Dimov, Canko Colov, Mara Marĉinova el la urba simfonia orkestro k. a. fondas E-grupon, kiu aŭtune de 1958 transformiĝas en E-societon „L. L. Zamenhof“ en Razgrad, kun prezidanto Petăr Nedelĉev Marinov.



Donacoj por la jubileo Petăr Nedelčev — mult-jara E-aktivulo.

Foto: Evelin Zagorov

En la sama tempo en urbo Kŭbrat d-ro Ivan Kirčev fondis E-societon „Progreso“. Kreiĝas ligo kun la Centra Estraro (tiam Centra Komitato) de BEA en Sofio, komenciĝas regula organiza vivo.

Fine de 1960 estas fondita Distrikta Komitato de BEA en Razgrad kaj estas elektita ĝia estraro.

La jarkonferenco de DE de BEA (Razgrad) en 1982 elektis kiel prezidanton de la distrikta estraro d-ran Ivan Kirčev.

La laboro serioze pliboniĝis. Oni organizas diversajn instruajn, kultur-klerigajn kaj aliajn aranĝojn. Tie kaj tie estis organizitaj E-kursoj — pli ol 20 jare en la distrikto, estis organizitaj novaj E-societoj en Senovo, Loznica kaj Hlebarovo, ankaŭ dua E-societo „Stefan Minkov“ en Razgrad. Ni garantiis nian financon bazon, fondinte al la distrikta estraro la Ekonomian Entreprenon por Servoj „Globus“, kiu apartigas kaj transdonas al la distrikta estraro dekal-kulojn de la gajno. (Komparu: dum en 1971 la Distrikta Estraro de BEA — Razgrad havis budĝeton, en kiu la enspezoj estis 630 lv kaj la elspezoj — 318 lv., en la forpasinta 1985 la budĝetenspezoj estis 54 432 lv kaj la elspezoj — 24 370 lv.). Nun ni havas pli bonajn kadrojn, pliboniĝis la disciplino, kreiĝis kontaktoj kun la E-estaroj en niaj ĝemelurboj en GDR kaj Hungario.

Konklude — ni estas tre fieraj pro la sukcese efektiva vigita XIX Nacia Revuo de la E-Parolo kaj Kanto, kiu okazis ĉi-printempe en nia urbo (31. III.—2. IV. 1986). Tiun gravan aron ĉeestis pli ol 800 esperantistoj kaj multaj gastoj.

En septembro 1986 en Razgrad okazos alia E-renkontiĝo — Festo de la Fekundeco. Do la Distrikta Estraro akumulas fortojn kaj sperton por plua sukcesa laboro.

Ivan TERZIEV,
sekretario de DE de BEA — Razgrad

FAKTOJ KAJ CIFEROJ

En 1985 en la distrikto de Razgrad estis 419 organizitaj esperantistoj

●funkciis 20 kursoj de Esperanto, 7 el kiuj — en Razgrad

●funkciis 7 lernejanaj E-klubo

●aktivis la E-societoj en Razgrad, Kŭbrat, Isperliĥ, Loznica, Hlebarovo kaj Senovo.

Plena apogo

Interparolo kun GANĈO DOBREV, vicprezidanto de la Distrikta Popola Konsilantaro — Razgrad

— Via opinio pri la E-movado en Bulgario?

— Kiel kultura institucio Bulgara Esperantista Asocio sendube respondas al la kreskintaj kulturaj interesoj de la laboruloj. Ĝi ludas gravan rolon por altiro de la junularo al la kultura kaj socia vivo en la distrikto. Per sia agado BEA grandskale ebligas kontaktojn de homoj el diversaj urboj de nia lando, el diversaj landoj de la terglobo. Tio kontribuas por plua plivastigo de la kultura horizonto de la bulgario, pliriĝigas lian spiritan vivon. La Esperanto-movado estas plia ebleco por propagando de la bulgaraj literaturo, scienco kaj kulturo alilande.

— Viaj impresoj pri la agado de la esperantistoj en Razgrad-distrikto?

— Dum la lastaj 2—3 jaroj la Distrikta Estraro de BEA — Razgrad, plivigliĝis sian agadon. Nun, kiam nia lando travivas periodon de aktiva kultura evoluo, la E-movado trovas sian naturan lokon kaj publikan manifestiĝon en la kulturaj rondo de la distrikto. La Esperantista Domo de Kulturo en Razgrad estigis centro de interesaj aktivecoj, de renkontiĝoj kun elstaraj sociagantoj kaj aktivuloj, kun niaj kaj alilandaj kreantoj en la sfero de la literaturo, teatro, muziko...

La Festivalo de E-Parolo kaj Kanto estis natura daŭrigo de tiuj aktivecoj de Bulgara Esperantista Asocio en la distrikto de Razgrad. La kreita tie ĉi aktiva esperantista kerno jam estas grava ĉenero en la socia kaj kultura vivo de la distrikto.

— Kion vi povus diri pri la kunlaborado inter DE de BEA — Razgrad kaj la soci-politikaj organizado en la distrikto?

— Per ilia helpo DE de BEA sukcese realigas sian kulturan programon, ebligas la realigon de diversaj iniciatoj. La E-movado en nia distrikto ĝuas la plenan apogon de la Distrikta Komitato de Bulgara Komunista Partio kaj la Distrikta Popola Konsilantaro, de la gvidantoj de diversaj produktadentreprenejoj — per ilia aktiva helpo nun en la distrikto oni preparas alian grandskalan aron — la III (internacian) etapon de la kvizo dediĉita al la Dektria kongreso de BKP kaj al la 100-jariĝo de Esperanto.

La sukcesoj de la esperantistoj en Razgrad-distrikto sendube estas ŝuldataj ankaŭ al ilia intima kunlaboro kun la ceteraj soci-politikaj kaj kulturaj organizoj — Komunuma kaj Distrikta komitatoj de la Patrolanda Fronto, Distrikta Konsilantaro pri Kulturo, Centro „Standardo de la Paco“, Distrikta Junulara Domo k. a.

Miaopinie la ĝusta vojo por disvastigo de Esperanto estas la vojo de aktiva kunlaborado kun la amasaj organizaĵoj, de aktiva partopreno en la kulturaj iniciatoj de la distrikto.

Intervjuis: M. TODOROVA

BULGARA-SVEDA KUNLABORADO

Antaŭ pli ol du jaroj la prezidantino de la gotenburga E-klubo Märta Andreasson (Svedio) kaj la direktoro de la Internacia Esperanto-Kursejo Angel Todorov (Bulgario) lanĉis la ideon evoluigi amikajn interrilatojn inter bulgaraj kaj svedaj geesperantistoj.

Oni komencis interŝanĝi malgrandajn grupojn kaj tiel komenciĝis la kunlaboro inter la E-klubo en Gotenburgo kaj IEK-Bulgario — interŝanĝo de opinioj, de organiza sperto, ktp. Kaj, kompreneble, konatiĝo kun la historiaj kaj kulturaj vidindaĵoj de ambaŭ landoj.

Ci-jare bulgara grupo denove partoprenis la Internacian E-Kurson (12.—16. V. 1986), organizitan de la Sveda E-Federacio — Okcidenta regiono, kaj de la E-klubo en Kungälv, apud Gotenburgo. La Nordia¹ Popola Altlernejo bele situanta sur la Fontin-montaro, gastigis ĉiujn pli ol 55 geesperantistojn alvenintajn en Kungälv. De tiu pitoreska loko malkovriĝas mirinda vido al la fortikaĵo de Bohus kaj al la valo de rivero Göta.

La kurson partoprenis multaj svedaj, norvegaj kaj kelkaj bulgaraj geesperantistoj, ĉar ĝi ĝenerale estis organizita por la nordaj landoj. Kiel instruistoj estis invititaj Oszkar Princz el Hungario kaj Ivica Spoljarec el Zagrebo. En la programo krom la lecionoj estis ankaŭ kulturaj aranĝoj. Kun granda intereso oni akceptis la prelegon pri Bulgario kaj pri IEK, kun plezuro rigardis la filmojn pri Bulgario en Esperanto. Estis ankaŭ prelego pri la kultura E-servo kaj informoj pri la tradicia pupfestivalo en Zagrebo.

Ege interesa kaj emociplena estis la pacprogramo (okaze de la Internacia Jaro de Paco), organizita de Märta Andreasson kun la aktiva partopreno de ĉiuj eksterlandanoj. Oni rakontis pri E-aranĝoj en Bulgario, Hungario, Nor-

vegio, Svedio dediĉitaj al la Jaro de Paco. Reprezentantoj de la pacmovado en Kungälv defale rakontis pri siaj multnombraj aranĝoj kaj ĉiuj rigardis belegan diafilmon pri pacmarŝo okazinta en la regiono de Kungälv. Ĉiuj sincere esprimis sian vidpunkton rilate la mondan pacon: ke la homoj volas vivi en paco, interkompreniĝo kaj per diversaj rimedoj batalas kontraŭ la nukleaj armiloj. La skandinavaj landoj estas bona ekzemplo pri tio kiel najbaraj landoj kaj popoloj povas vivi en paco. Jam plurajn jardekojn ili vivas en paca bonnajbareco kaj interkompreniĝo. Poste la geesperantistoj kantis en Esperanto porpacajn kantojn. Sonis ankaŭ bulgaraj kaj svedaj kantoj por paco.

Folkloro grupo el Kungälv prezentis belegajn popoldancojn kaj kantojn, montris malnovajn popolajn manlaboraĵojn.

Rimerkinda estas la sveda gastamo, kiun ni spertis ĉiumomente dum la Internacia Semajno kaj ankaŭ poste.

Kiel rezulto de la okazintaj bulgaraj-sveda interparoloj estis subskribitaj protokoloj pri interŝanĝo de E-lernantoj kaj pri kunlaborado inter la Nordia Popola Altlernejo en Kungälv. Svedio kaj la Internacia Esperanto-Kursejo, Bulgario. Oni informis nin, ke en la Nordia Popola Altlernejo oni intencas instrui ankaŭ Esperanton.

Mi kredas, ke la bulgaraj-svedaj interrilatoj profundigos kaj fortikiĝos.

Cvetka MITEVA

Nordia (angle: nordic) — norda, skandinava. La vorto „nordia“ ne ekzistas en la Esp. vortaro, sed ni decidis konservi ĝin, ĉar la aŭtoro de la ĉi-supra artikolo asertas, ke ĝi estas uzita en la subskribitaj protokoloj. La ĝusta E-traduko verŝajne estas Norda Popola Altlernejo aŭ Skandinava Popola Altlernejo. — Noto de la redaktoro.

PRI UNU INTERVENO DE LA REDAKCIO

Mi donis al „Bulgara Esperantisto“ artikolon titolitan „Pri la prefikso. prepozicio kaj akuzativo“.

La artikolo komenciĝis tiel:

„PIV rekomendas: „Malkonsilinde estas uzi akuzativon anstataŭ prepozicio, kiu signifas deiron, formovon kaj tiel kontraŭdiras la direktan signifon: oni diru: eliri el urbo kaj ne: eliri urbon.“

Tiu ĉi rekomendo, tamen, ne estas sekvata. Vidu, ekzemple, la artikolon: „Esperanto-turismo por neesperantistoj“, Margit Evva, „Esperanto“, 1983, p. 68: „Se ni volas disvastigi la Movadon ni devas malfermi la pordojn kaj eliri la fermitan rondon.“

La redakcio de BE forstrekiis „Vidu, ekzemple, la artikolon: „Esperanto-turismo por neesperantistoj“, Margit Evva, „Esperanto“, 1983, p. 68: „Se ni volas disvastigi la Movadon ni devas malfermi la pordojn

kaj eliri la fermitan rondon.“

La artikolo estis publikigita en n-ro 5/1985.

Kaj jen kion kaŭzis tiu ĉi redakcia interveno.

En n-ro 30/1986 de „Filologo“ Violin Oljanov skribas:

„En n-ro 5/1985 de „Bulgara Esperantisto“ Ljubomir Miĥajlov publikigis artikolon sub titolo „Pri la prefikso, prepozicio kaj akuzativo“, en kiu el malĝustaj premisoj li faras erarajn deduktojn. Jam en la komenco li ĵetas panikan bombon asertante, ke la rekomendo de PIV ne anstataŭigi prepozicion per akuzativo ĉe deiro, formovo, NE ESTAS SEKVATA (la emfazo — mia)! Verŝajne li deziras diri, ke ne estas sekvinda (laŭ lia subjektiva deziro), ĉar fakte ĉiuj bonaj esperantistoj sekvas tiun Fundamentan regulon“.

Sian kritikon al miaj konsideroj, kiuj fakte celis pravigi la uzitan en „Esperanto“ esprimon, V. Ol. finas per la vortoj: „... la Esperanto-eldonaĵoj ne devas doni lokon al tiaj provo.“

Ljubomir MIĤAJLOV

LA ESPERANTO-LIBROJ EN SERVO AL LA PACO



Parto de la Esperanto-stando en la ekspozicio.

Foto: Ivan Ivanov

Por Internacia Lingvo la libro havas grandegan signifon. Ni eĉ ne povas imagi kio okazus, se en Esperanto ne aperus libroj, kio okazos, se ni ne havus aŭtorojn, eldonejojn, pre-sejojn — tiam eble nia lingvo iom post iom velkos kaj kune kun ĝi velkos la mirinda ideo pri internacia lingvo.

Dum preskaŭ cent jaroj en Esperanto estis kreita impona literaturo. Nun en multaj landoj aperas Esperantaj libroj, en multaj landoj ekzistas Esperanto-eldonejoj kaj dank' al la komunaj klopodoj nia lingvo floras kaj kune kun ĝi floras la Esperanto-kulturo.

Bulgario estas unu el la landoj, kiuj signife kontribuas al la monda Esperanto-libroeldonado. Bulgara Esperantista Asocio, fidela al la historia misio de Esperanto-libro, konstante plivastigas sian eldonagadon, kiu estas bone taksata kaj stimulata de Stata Unuiĝo „Bulgara Libro kaj Periodaĵoj“. Elokventa atesto pri tio estas la fakto, ke ankaŭ ĉi-jare Bulgara Esperantista Asocio estis invitita partopreni en la XVII Internacia Ekspozicio-Foiro de la Libro — Sofio'86. Tiel por dua fojo ni havis eblecon prezenti niajn librojn en tia im-

pona internacia libroekspozicio, en kiu partoprenis 47 landoj el Eŭropo, Azio, Afriko, Ameriko, 127 librofirmaoj kaj 900 eldonejoj.

La ekspozicio, kiu okazis de la 4-a ĝis 9-a de junio 1986, estis aranĝita en la eleganta Kulturpalaco „Ljudmila Jivkova“.

La 4-an de junio la prezidanto de la Komitato pri Kulturo Georgi Jordanov oficiale inaŭguris la ekspozicion. En sia parolado li diris, ke la XVII Internacia Ekspozicio-foiro de la Libro — Sofio'86, estas dediĉita al la Internacia Jaro de la Paco kaj emfazis la gravan rolon de la libro en servo al la mondpaco. Georgi Jordanov, kune kun la membroj de la diplomaciaj misioj en Bulgario kaj la aliaj oficialaj gastoj, kun granda intereso trarigardis la ekspozicion. Li speciale esprimis sian admiron pri la profesie aranĝita stando de Bulgara Esperantista Asocio. Al la fremdlandaj gastoj lin akompanantaj, li diris:

— En Bulgario Esperanto estas tre populara, kaj ankaŭ mi lernis ĝin.

Dum la sep ekspoziciaj tagoj preskaŭ sep mil personoj vizitis la standon de Bulgara Esperantista Asocio. Inter ili estis reprezentantoj de eksterlandaj libro-firmaoj kiel ekzemple s-ro Ken Kalfus el Filadelfio, Usono, kiu esprimis la deziron subskribi komercan kontrakton pri aĉetado de libroj, eldonitaj de Bulgara Esperantista Asocio.

Multaj vizitantoj esprimis sian surprizon pri la riĉa Esperanta libroeldona agado. La konata bulgara pentristo Todor Krâstev skribis en la memorlibro: „Mi estas agrable surprizita pri la stando de BEA“. Kaj jen la opinio de Todor Georgieva el Sofio: „La stando de Bulgara Esperantista Asocio estas unu el la plej imponaj. Belege aranĝita, ĝi enhavas valorajn kaj interesajn librojn.“

Ankaŭ la ĉina esperantistino Shi gui-bao esprimante sian kontentecon pri la ekspozicio, aldonas: „Kun granda intereso mi renkontiĝis kun esperantistoj el via lando. Via sincera amikeco profunde impresis min. Mi deziras al vi ĉion bonan.“

La stando de BEA dum la XVII Internacia Ekspozicio-foiro de Libro — Sofio'86, havis grandegan signifon, ĉar antaŭ la centjara jubileo de Esperanto ĝi donis riĉajn informojn pri la Internacia Lingvo, pri la tutmonda Esperanto-movado, pri ĝiaj agado kaj celoj.

Ankoraŭfoje ni, la bulgaraj esperantistoj, prezentis nin antaŭ la vasta publiko, deklarante, ke Esperanto, kiel kultura fenomeno, per sia valora literaturo jam tutan jarcenton servas al la paco kaj amikeco inter la popoloj.

Georgi MIHALKOV

PRI LA NOVA STRUKTURO DE BEJ

Dum la lastaj jaroj la E-movado en Bulgario plivigliĝis kaj plinombriĝis, precipe per novaj junaj esperantistoj. Estis kreitaj multaj lernejanaj E-klubo, studentaj E-grupoj. Bulgara Esperanto-Junularo nun havas proksimume 3000 membrojn.

La 41-a kongreso de BEA akceptis novajn ŝanĝojn kaj aldonojn al la Statuto de BEA, ankaŭ rilate la strukturon de la bulgara esperantista movado.

Laŭ la novaj postuloj Bulgara E-Junularo devas krei junularajn grupojn enkadre de la lokaj societoj. Oni ne plu rajtas krei junularajn societojn. En urboj oni rajtas havi unu lokan E-societon kaj ĝelernantajn, studentajn kaj ĝenerale junularajn grupojn al tiu ĉi societo. Se en la lokloko ne estas E-societo, sed estas ĝelernantoj, kiuj lernas Esperanton, tiu grupo devas aliĝi al la E-societo en la plej proksima loko. La junularaj grupoj devas havi estraron — prezidanto, vicprezidanto, sekretario kaj estraranoj.

En la lernejoj, laŭ decido de la societa estraro, oni devas fondi ĝelernantan E-grupon. Post la kunveno tiu grupo faras protokolon en 4 ekzempleroj: po unu ekzemplero por la societa kaj distrikta estraroj, por la Centra Estraro en Sofio kaj por la grupo mem. En la protokolo oni notas la nomon kaj adreson de la grup-estraranoj, kaj ankaŭ la nomon kaj adreson de la grup-vidanto aŭ E-instruisto. La grupanoj pagas sian membrokotizon al la loka E-societo. Por ĝelernantoj, studentoj kaj soldatoj la membrokotizo estas 0.60 lv. La E-instruistoj, la societa kaj distrikta estraroj de BEA helpas la agadon de la lernejanaj grupoj.

Se en iu lernejo ekzistas kelkaj E-grupoj, oni povas krei lernejanan E-organizaĵon en tiu ĉi lernejo, kiu organizaĵo havas sian estraron — prezidanto, vicprezidanto kaj sekretario. Tiu E-organizaĵo samtempe funkcias kiel klubo, grupo aŭ sekcio al la Klubo de Internacia Amikeco ĉe tiu lernejo. La lernejanaj E-grupoj kaj organizaĵoj estas gvidataj metode de la Instruista sekcio ĉe CE de BEA kaj partoprenas la agadon de BEJ.

Laŭ decido de DE de BEA, studentoj rajtas krei apartan studentan E-societon ĉe la altlernejo, kie ili studas. Same estas en fabrikoj kaj entreprenoj — la junaj esperantistoj laborantaj en iu fabriko aŭ entrepreno, povus krei profesionan junularan E-societon, se la societa aŭ distrikta estraro decidus tion.

Ĉiuj ceteraj ĝejunuloj agadas en junularaj grupoj ĉe la lokaj E-societoj. Bulgara Esperanto-Junularo havas estraranojn en ĉiuj distriktaj estraroj de BEA, kiuj respondecas pri la reciproka informado inter la centra estraro de BEJ kaj la junaj esperantistoj el la distriktaj E-organizaĵoj, kaj prizorgas la partoprenon en junularaj aranĝoj. La estraro de BEJ regule informas siajn aktivulojn en la distriktoj pri diversaj junularaj iniciatoj en nia lando kaj eksterlande.

La junularaj E-grupoj laŭ instrukcioj de la societa estraro organizas jarkunvenojn por elekto de nova estraro de la E-grupo aŭ por organizaj demandoj. Minimume foje en 3 monatoj la junulara grupo organiza kunvenon.

La junularaj E-grupoj povus fondi junularajn E-klubojn ĉe junularaj domoj, komsomolaj organizaĵoj, kompreneble, se tiuj instancoj konsentas kaj la societa estraro permesus, ĉar oni devus konsideri ilian statuton. La E-societoj kaj grupoj helpas la agadon de tiuj E-klubo.

En DE de BEA oni povus krei komisionon por junularaj aferoj, en kies laboro devus partopreni la prezidantoj de lernejanaj organizaĵoj aŭ de la aliaj junularaj grupoj en la distrikto. La estraro de BEJ strebas aktivigi siajn funkciulojn, sed tio dependas de la bona laboro ankaŭ en DE de BEA.

Ni kredas, ke la junaj bulgaraj geesperantistoj estas pretaj plenumi la decidojn de la 41-a kongreso de BEA kaj, konforme al la nova strukturo, aktive kaj fruktodone kunlabori en la lokaj societoj sub la gvido de la estraro de BEJ.

Cvetka MITEVA,
prezidantino de BEJ

LAŬ DANUBO SUB LA E-FLAGO

Originala iniciato ligis la kulturajn aranĝojn de du diversaj organizaĵoj en la distrikta urbo Ru-se: la Sipentreveno „Bulgara Rivera Navigado“ kaj la Kooperativa Esperanto-Societo „Verda Stelo“. Paŝintjare en la loka Faklernejo pri Rivera ŝipkonstruado kaj ŝipnavigado „A. Ivanov“ estis organizita E-kurso, kiun gvidis Stojan Voĵĉev (Foto n-ro 1). Es-tontaj ŝipkonstruistoj, meĥanikistoj kaj ŝipkapitanoj lernis Esperanton kune kun sia kursinstruistino To-dorka Stoeva.

Fine de aprilo j. k. la kursanoj de Stojan Voĵĉev sukcese ekzamenigis en ĉeesto de reprezentantoj de la lerneja kaj societa estraroj kaj de la prezidanto de DE de BEA en Ruse Veliko Dimov.

La novaj esperantistoj decidis dum sia estonta navigado laŭ Danubo, post la fino de la lernado, popularigi Esperanton — la lingvon de amikeco inter la popoloj (Foto n-ro 2).





Karaj legantoj.

En n-ro 2/1986 de „BE“ vi jam legis intervjuon kun la juna hungara ŝakistino kaj esperantistino Susana Polgár, kiun ni ĉerpis el „Hungara Vivo“.

Kaj jen nun la plej freŝa novaĵo pri ŝiaj sukcesoj sur la ŝaka kampo: en n-ro 6/86 de „Budapeŝta Informilo“ oni povas legi: „La 17-an de majo la hungara ĉefurbo estis loko de sporthistoria senzacio! Zsuzsa Polgár, 17-jara esperantistino, atingis la 3-an lokon en la landa vira konkurso pri ŝako, venkinte — inter aliaj — du internaciajn grandmajstrojn. Kiel tria lokito ŝi rajtos partopreni la internacian zonan konkurson — okazontan en januaro 1987 en Pollando — por titolo vira mondĉampiono pri ŝako. Gis nun neniu virino atingis tiun ĉi rezulton!“

„BE“

AMIKA RENKONTIGO

La 30-an de majo ĉi-jare en la klubejo de havenlaboristoj en Varna okazis por dua fojo junulara renkontigo de junaj esperantistoj el la distrikto. Partoprenis 40 gejunuloj-lernantoj, studentoj, laboristoj kaj gastoj el aliaj urboj de la lando.

Salutojn al la partoprenantoj en la nomo de DE de BEA prezentis ĝia vicprezidentino Dobrinka Trănkova. En amika etoso la gejunuloj interŝanĝis spertojn pri sia E-aktivo.

Zenica FILIPOVA

Kara gasto el Belgio

Dum la Aŭsgburga Universala Kongreso ni kun li interkonsentis helpi la ĝemeliĝon de la Distrikta Komitato por Paco en Veliko Târnovo kun la Provinca Porpaca Komitato en Liège, Belgio,¹ pere de Esperanto. Post kelkmonata preparlaboro nia iniciato efektiviĝis. La 28-an de majo la Ĝenerala Sekretario de MEM Clément Tholet alvenis en la antikvan ĉefurbon de Bulgario por plenumi tiun gravan taskon.

La saman tagon la Distrikta Porpaca Komitato en Veliko Târnovo ĉe kape kun ĝia prezidanto Rajčo Penčev organizis oficialan akcepton honore al la gasto. Ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de la Komitato por Eŭropa Sekureco kaj Kunlaborado, de la Komitato de la Movado de Bulgaraj Virinoj, de la Patrolanda Fronto k. a. K-do Tholet informis pri kelkaj problemoj de la porpaca movado ĝenerale kaj pri la porpaca aktivado de la monda esperantistaro. Okazis amika diskutado, post kio, en ege festa kaj intima atmosfero, estis subskribita kontrakto pri duflanka kunlaborado inter la regionaj pacmovadoj en Veliko Târnovo kaj Liège. La kontrakto antaŭvidas Esperanton kiel lingvon de la korespondado. Ĝi devigas ambaŭ komitatojn aktive partopreni en la iniciatojn de la Monda Konsilio kaj aktivigi la ligojn kun esperantistoj-pacbatantoj.

Dum la sekvantaj tagoj la programo de nia gasto estis streĉita kaj riĉa. Li estis akceptita de la Distrikta Estraro de BEA en Veliko Târnovo. Oni interŝanĝis informojn pri la nuna stato de MEM-agado kaj de la pacagado ĝenerale. K-do Tholet informis nin pri la antaŭstarantaj taskoj kaj iniciativoj de la du movadoj, esprimante sian kontentecon pri la E-aktiveco en Bulgario kaj en la distrikto.

Similan renkontiĝon li havis ankaŭ kun la E-aktivularo en Polŝi Trămbes. Ĉeestis ĝeinstruistoj, ĉe kape kun la gimnazia gvidantaro, kaj ĉirkaŭ 100 aktivuloj de la Komsomola organizaĵo, kun kiuj K-do Tholet havis vigan interparolon pri la stato de la okcidenta junularo kaj ties partopreno en la porpaca batalo, pri la bonegaj vivkondiĉoj de la bulgara junularo.


En apuda vilaĝo Pavel K-do Tholet gastis en la klubejo de la junpionira organizaĵo. La lerneja direktoro Stojan Nikolov konigis al K-do Tholet la partoprenon de la vilaĝo en la kontraŭfaŝisma batalo. La junpioniroj kore dankis al la kara gasto pro lia parolado kaj montris intereson al la Internacia Lingvo.

Interesaj estis ankaŭ la renkontiĝoj en urbo Gorna Orjaĥovica. Tie nin atendis la prezidantino de la loka Porpaca Komitato Stojanova, direktorino de la faklernejo, kiu preparas specialistojn por la sfero de publika nutrado. Intime, sincere kaj varme akceptis K-don Tholet la instruistaro kaj la ĝelernantoj de tiu ege bone organizita lernejo. Simila renkontiĝo okazis ankaŭ en Dua elementa lernejo de la sama urbo. Tie la junpioniroj montris siajn sukcesojn en la pentarto, dediĉitajn al la paco. Unu el ili eĉ ricevis valoran hindan premion je la nomo de Gjavaharlar Neru. . . Nin salutis ankaŭ junpioniroj-esperantistoj.

La lasta renkontiĝo de la gastoestis kun la gvidantaro kaj porpaca aktivularo en la Regiona estraro de la fervojoj — Gorna Orjaĥovica.

Ĉu la gastado de K-do Tholet kontribuis por la propagando de Esperanto? Jes, nature! Ja oni dum la tuta tempo povis aŭskulti de la gasto kaj de lia interpretanto la belsonan lingvon Internacian — iuj eĉ por unua fojo. Tio altigis la intereson al la lingvo kaj al la E-movado. Oni konvinkigis, speciale en la oficialaj medioj, ke Esperanto estas reala fakto, ke ĝi povas sukcese plenumi la rolon de neŭtrala lingvo en a internaciaj rilatoj

Aristo MANOLOV



MI DISRONIGOS BULGARION AL FINNOJ!...

Instruistoj, sed ne en la estraro. Mi estas membro de la E-klubo de Helsinki.

— **Kia estas la sorto de Esperanto en Finnlando?**

— Esperanto penetris en Finnlandon tra Svedio, la unuajn E-klubojn oni fondis fine de la pasinta jarcento. En 1904 aperis la unua lernolibro, kaj Esperanto-Asocio de Finnlando estas fondita en 1907. Tamen en 1914, dum la Unua Mondmilito, la aŭtoritatoj malpermesas ties agadon, ankaŭ de aliaj kulturaj organizaĵoj.

En 1918 la E-agado vigliĝas. Okazas kursoj en la Helsinka Universitato. Ekde 1920 aperas la gazeto „Esperanta Finnlando“, kaj en 1923 estas fondita Finnlanda Laborista E-Asocio.

En 1920 oni permesas la instruadon de Esperanto kiel fakultativa lernobjekto en ĉiuj lernejoj, se la direktoroj proponus ĝin. La Internacia Lingvo nun estas instruata nur fakultative en la lernejoj, ekster la deviga instruprogramo. Lernolibro „Privilegia vojo al la lingvosocio“ de Vilho Setälä, eldonita en 1958, estas uzata sukcese en multaj fremdaj landoj.

Nuntempe en Finnlando Esperanton oni instruas ankaŭ en vesperaj kursoj, organizataj de civitanaj kaj laboristaj kultur-insituitoj en la grandaj urboj: Helsinki, Turku, Tampere, Lahti, Oulu, Kuopio, Iisalmi ka. En tiu urboj estas ankaŭ la plejmulto da esperantistoj. Nun en nia lando estas 1200 esperantistoj el kiuj 900 estas membroj de la Esperanto-Asocio de Finnlando.

— **Kiuj estas la pli gravaj E-arangoj por 1986 en Finnlando?**

— La E-arangoj ĉe ni dum la kuranta jaro estas intensaj kursoj

por lingvolernado. Kurso de Esperanto okazos de la 23-a ĝis la 28-a de junio 1986 en Paimio (apud Turku). Alia kurso funkcios inter la 30-a de junio kaj 6-a de julio en la Somera Universitato en Juvaskylä. Ankaŭ en Hanko oni okazigas kurson en julio.

— **Por kioma fojo vi estas en Bulgario? Kiaj estas viaj impresoj pri nia lando kaj pri la bulgara E-movado?**

— En Bulgario mi estas por dua fojo. En 1978 mi partoprenis la sukcesan 63-an Universalan Kongreson de Esperanto en Varna. De la tiamaj kontaktoj kaj interparoloj mi konstatis, ke la bulgaroj estas ege helpopretaj kaj gastamaj homoj. Miaj nunaj impresoj pri via lando estas tre bonaj.

Mi vizitis Sofion, Plovdiv, la Internacian E-Kursejon en Pisanica, Smoljan, Baĉkovo-monaĥejon kaj Koprivŝtica. Kun intereso mi ekkonis ties pli gravajn kulturhistoriajn vidindaĵojn.

Utilajn kontaktojn mi starigis kun gvidaj funkciuloj de la Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio kaj kun la estraro de DE de BEA en Sofia-distrikto. En Finnlando mi intencas diskonigi la bonegajn kondiĉojn tutjare lerni kaj ferii en Pisanica (Rodopimontaro).

Mi studos la eblecojn por pli oftaj vizitoj de finnaj esperantistaj grupoj kaj de unuopuloj en Bulgario. Tio certe kontribuos por pli bona ekkono kaj amikiĝo de civitanoj de ambaŭ landoj, serve al ilia strebado al paco kaj interkompeniĝo en la mondo.

Intervjuis: Evgeni GEORGIEV

Antŭanelonge nian landon vizitis finna esperantisto **Taplo Sormunen**, kasisto de la Esperanta Ligo de Finnlandaj Instruistoj, delegito de Universala Esperanto-Asocio en urbo Espoo. La gasto estis afabla respondi al jenaj demandoj de reprezentanto de la redakcio de „BE“:

— **Sinjoro Sormunen, bonvolu prezenti vin.**

— Mi naskiĝis en urbo Suonenjoki (Meza Finnlando). Nun mi loĝas en urbo Espoo kaj laboras kiel kontisto en telefonfabriko de la firmao „Siemens“. Urbo Espoo troviĝas 18 km de la ĉefurbo Helsinki kaj havas 150 000 loĝantojn.

— **Kio instigis vin lerni Esperanton? Kiam kaj kiel vi estiĝis esperantisto?**

— En 1962, frekventante mezgradan komercan lernejon, mi partoprenis E-kurson en la redakcio „Kuluttaja“ — revuo por klientoj de la kooperativaj magazenoj. De tiu tempo mi korespondas kun diverslandaj esperantistoj. Mi povas diri, ke mi fakte esperantiĝis en la jaro 1972, kiam mi transloĝiĝis al Helsinki.

— **Ĉu vi aktivis en la finna E-movado?**

— Ĉi-momente mi estas kasisto de Esperanto-Ligo de Finnlandaj

SINCERAJN BONDEZIROJN!

Niaj amikoj el GDR d-ro Detlev Blanke — Generala Sekretario de GDREA kaj ĉefredaktoro de „Der Esperantist“ kaj Wera Dehler-estraranino de la Terminara Sekcio de UEA, geedziĝis la 22-an de majo 1986 en Berlino.

Ili estas bone konataj per siaj interesaj prelegoj antaŭ esperantista publiko.

Al la nova geedza paro la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ bondeziras longan vivon, feliĉon kaj fruktodonan poresperantan agadon.

Novaj libroj

Aleksiev, Nikola: *Mia porpaca agado*. Redaktis: Nano Kjuĉukov. La antaŭparolon verkis: Nano Kjuĉukov. Eld.: Bulgara Esperantista Asocio, 1986, p. 93. Formato: 20×14. Prezo: 0,55 lv.

Ĉu estas pli grava problemo ol la problemo pri la mondpaco? La honestaj homoj el la tuta mondo deziras vivi en paco kaj amikeco, sed malmultaj estas tiuj, kiuj dediĉas sian tutan vivon al aktiva porpaca batalo. Unu el ili estas la elstara bulgara esperantisto Nikola Aleksiev. Dum la infanaĝo li travivis la teruraĵojn de tri militoj, poste kiel junulo aktive partoprenis en la kontraŭfaŝisma batalo kaj donis sian kontribuon por la nuna feliĉa kaj paca vivo.

En la libro „Mia porpaca agado“ Nikola Aleksiev priskribas momentojn el sia interesa, streĉa kaj fruktodona vivo. Apartan lokon li dediĉas al la favoraj opinioj de Georgi Dimitrov pri Esperanto, al la misio kaj celoj de Mondpaca Esperantista Movado, kies longjara prezidanto li estis. Interesaj estas liaj rememoroj pri la agado de BuLEA kaj pri ĝia senlaca aktivulo Simeon Petrov. La libro ebligas al ĉiu leganto pli bone kaj pli profunde ekkoni unu el la plej sindonaj pioniroj de la bulgara Esperanto-movado.

Ŝivarov, Ivan: *Mia trezorejo*. Senpretendaj verkoj. Redaktis: Evĝeni Georgiev. Eld.: Bulgara Esperantista Asocio, 1985, p. 75. Formato: 20×14. Prezo: 0,50 lv.

Ivan Ŝivarov estas unu el la aktivaj bulgaraj esperantistoj, kiel profesia ĵurnalisto li verkis multajn artikolojn pri la Esperanto-movado en nia lando. „Mia trezorejo“, estas la unua libro de Ivan Ŝivarov, kiu aperas esperantlingve. En ĝi la aŭtoro sincere kaj alloge rakontas diversajn epizodojn el sia longa kaj interesa vivo. Multajn paĝojn Ivan Ŝivarov dediĉas al la amikeco inter la esperantistoj, al sia riĉa esperantlingva korespondado kun amikoj el la tuta mondo. Sincere verkita, la libro estas fenestro al homo, kies vivocelo estis la paco kaj amikeco inter la popoloj.

G. M.

GASTOJ EL HUNGARIO

La 26-an de majo j. k. al la membroj de E-societo „Trifon Hristovski“ — Botevgrad, gastis hungaraj esperantistoj ĉe-kape kun k-do Bebeŝi — sekretario de la Peŝta E-Komitato. Post promenado tra la urbo, okazis kora kaj sincera renkontiĝo, kiun ĉeestis ankaŭ Ivan Culev — prezidanto de DE de BEA en Sofio en la loka E-klubejo.

Canka HAĜIEVA

UTILIGU KROMAN TEKSTON!

Por ŝanĝi la ritmon de la instruproceso, la instruisto povus dum kelkaj minutoj proponi tekston (ne el la lernolibro), kiu enhavu la malnovan lingvan materialon en nova formo. Tiucele li povas elekti facilan tekston kun precipe konata leksiko — el gazeto, revuo, legolibro k. a.

Kiel procedi? La instruisto legas klare kaj esprimplene frazon post frazo. Ĉiu frazo estas tuj tradukenda de aparta lernanto, kiun montras la instruisto. Se necese, la instruisto serĉas la helpon de la ceteraj lernantoj.

Foje mi vizitis la 8-an klason en VIII ESPU „Vasil Levski“, en Sofio. La ĝelernantoj de tiu klaso studas Esperanton devige, paralele kun la angla lingvo. Georgi Dejanov, sperta instruisto pri franca lingvo kaj Esperanto, lerte enŝovis tekston el... INFORMILO (eldono de BEA pri la instrua laboro). La titolo de la teksto estis: **Rezolucio**. La 19-a konferenco de la Internacia Ligo de Instruistoj, okazinta de la 22-a ĝis 29-a de julio 1985 en Kungälv — Svedio, okupiĝis pri la temo „English — yes, Esperanto — jes..“

La lernantoj tre facile komprenis la enhavon de la teksto, sed eble ne tiu estis la fina celo de la instruisto... Li bonege uzis la temon de la menciita konferenco por atentigi la lernantojn, ke ili mem studas kaj anglan lingvon, kaj Esperanton... Tial li lerte enŝovis tiun temon el la ĉiutaga vivo de la lernantoj, kiuj same studas anglan lingvon kaj krome devas studi paralele kun ĝi la internacian lingvon Esperanto. Rezulte ĉe tiuj lernantoj la studado de Esperanto estis bone motivita kaj mi opinias, ke ili longe memoros tiun ŝajne tute hazarde enŝovitan tekston...

Sed tamen, la enŝovo de simila teksto el la vivo de la tutmonda esperantistaro havas ankaŭ alian celon, nome interesi la ĵelernantojn pri la eksterlanda E-movado, kutimigi ilin informiĝi per la E-periodaĵoj, ekster la lernolibro, pri la movado (enlanda kaj alilanda), legi memstare E-tekstojn ekster la lernejoj okupoj, kompreneble helpe de vortaro.

Marin BACEV,
ĉefmetodikisto ĉe BEA

LETERVESPERO

Nia Esperanto-klubo organizos letervesperon en novembro 1986. Ĉiuj leteroj kaj bildkartoj estos responditaj.

Nia adreso: ESPERANTO-KLUBO

SDK
PARKOWA 6
28-200 STASZOW
POLLANDO



NIKOLAJ KUZNECOV — JAM LEGENDO

La 27-an de julio 1986 pleniĝis 75 jaroj depost la naskiĝo de la legenda soveta partizano kaj sekreta militesploristo dum la Granda Patria Milito Nikolaj Ivanoviĉ Kuznecov, pereinta en 1944 kaj postmorte honorita per la titolo de Heroo de Sovetunio.

Pri li estas verkitaj multaj libroj, produktitaj filmoj, sursceniĝitaj teatraĵoj. Stratoj en multaj sovetaĵ urboj portas lian nomon.

„Venonta kion portas tago?

Mi ĝin ne trovas en imago,
ĝi en profundo kaŝas sin.“

— per tiuj ĉi vortoj el la opero „Eŭgeno Onegin“ komencis ĉiun sian tagon Nikoŝa Kuznecov (tiel oni nomis lin en la juna aĝo), kantante ilin en Esperanto. Sed estas malfacile konstati de kie aperis ĉe la ordinara vilaĝana junulo deziro ellerni Esperanton. Eble li eksciis, ke la arde adorata de li verkisto Maksim Gorkij estis adepto de Esperanto, aŭ pravas la kunlernanto de Kuznecov Leonid Nikolajeviĉ Ostroumov: „Estis la jaro 1925. Tiutempe ni vivis antaŭsentante la Tutmondan revolucion. Niaj instruistoj en la lernejo diradis, ke latino de la vernkinta proletaro estos la lingvo Esperanto. Kaj kiam la instruisto de rusa lingvo Suetin Sergej Nikolajeviĉ anoncis pri la fondiĝo de Esperanto-rondeto, ĉin komencis vizitadi pli ol la duono de la lernantoj de sepa klaso. Inter la rondetanoj mi memoras Nikoŝa'n Kuznecov, Miŝa'n Petrov, Kola'n Prohorov, Saŝa'n Kuznecov... Tiutempe Nikoŝa jam unu jaron studis la germanan lingvon sub la gvidado de la instruistino de germana lingvo en la lernejo Nina Aleksejevna Aŭtokratova. Nikoŝa ne forlasis

Esperanton. Komencinte la unuan lernejon de Tjumen aĝrikultura teknikumo aŭtune de 1926, li tuj trovis rondeton de esperantistoj. La rondeto estis sufiĉe granda. Ĉin vizitis ĉirkaŭ 40 homoj. Gvidis la rondeton sperta esperantisto, juristo Georgij Nikolajeviĉ Besednih. „Nikoŝa Kuznecov kontentige posedis Esperanton, — rememoras Georgij Nikolajeviĉ — kaj mi proponis al li esti mia helpanto en la rondeto. Nikoŝa estis tre diligenta knabo. Li partoprenis en ĉiuj aranĝoj, bonege deklamis, ludis harmonikon, amuzis ĉiujn per ŝercoj, estis eksterordinare inventema. La 7-an de novembro 1926 dum la manifestacio super la kapoj de la manifestantoj aperis granda slogano: „Vivu la 9-a jaro de la Granda Oktobra Revolucio!“ Tiun sloganon preparis Nikoŝa Kuznecov kaŝe de siaj amikoj-esperantistoj kaj proponis al ili malkovri ĝin sur la placo antaŭ la tribunuo. Unu el la lokaj partiaj gvidantoj, staranta sur la tribunuo, posedis Esperanton kaj tradukis la sloganon en la rusan lingvon al la aliaj. Decembron 1926 Nikoŝa Kuznecov fariĝis komсомolano. Ni, liaj amikoj-esperantistoj solenis tiun ĝojan por li eventon per pano kun kolbaso kaj limonado. Ĉe ni, en Tjumen, Nikoŝa aniĝis al SEU (Sovetrespublikara Esperantista Unio). La numero de lia membrokartoj estis 47001.“

En 1927 Kuznecov forveturis el Tjumen kaj komencis studi en la Talica forsta teknikumo. Dum lia foresto en Talica sufiĉe forte prosperis l Esperanto-movado. La 2-an de majo 1927, nelonge antaŭ la reveno de Kuznecov el Tjumen, en Talica forsta teknikumo fondiĝis Esperanto-rondeto. Al la rondeto aliĝis ankaŭ Kuznecov. Gvidis la rondeton Jaruck Franc Franceviĉ — instruisto de la germana lingvo. La rondeto havis sufiĉe bonan bibliotekon de Esperanto-literaturo. Jam bone posedanta la lingvon, Nikoŝa persiste legis esperantajn librojn. La rondetanoj aktive korespondis kun germanaj komсомolanoj-esperantistoj kaj Nikoŝa ankaŭ komencis plenumi tiun laboron.

De la infanaĝo inklina al la studado de fremdaj lingvoj, li intencis en 1941 fariĝi studento de la Moskva Instituto de Fremdaj Lingvoj. Sed la milito trovis alian aplikon por liaj lingvistikaj kapabloj. Poste, en malamika ariero, neniam kaj neniu el liaj kunparolantoj-germanoj ne ekdublis, ke li interparolas ne kun samlandano.

Printempe de 1943 la soveta komandantaro el diversaj fontoj ricevis informojn, ke la malamiko komencis preparadon de giganta

ofensivo apud urbo Kursk. Inter la informoj estis ankaŭ mallonga sciigo de speciala partizana taĉmento, gvidata de Medvedev kaj siutanta apud urbo Rovno (okcidenta Ukrainio). En la radiogramo oni sciigis, ke laŭ vortoj de germana oficialulo, Hitler „preparas por la bolŝevikoj surprizon“ apud Kursk. De la sama persono estis ricevitaj sciigoj pri tio, ke oni vaste uzos novajn tankojn nomatajn „tigroj“ kaj „panteroj“. La informo estis valora pro tio, ke ĝi estis ricevita de Erich Koch — Reichkommissar de Ukrainio, Gauleiter de Orienta Germanio. Tiun informon ricevis Nikolaj Ivanoviĉ Kuznecov, kiu en uniformo de Oberleutnant de la Wehrmacht sukcesis ricevi aŭdiencon ĉe Koch, gajnis lian favoron kaj aŭdis de li la vortojn, kiuj malkaŝis al la soveta komandantaro la strategajn intencojn de la malamiko.

Pro la nura ekposedo de tiom gravaj informoj la nomo de Kuznecov povus esti rajte enskribita en la historion de la milito. Estis ankoraŭ multaj gloraĝoj de Kuznecov. Ekzemple, dum longa tempo la soveta informa servo celis malkovri situon de milita stabloĝejo de Hitler. La sekreto de la stabloĝejo malsekretigis Kuznecov, kiu kune kun siaj amikoj-partizanoj kaptis du germanajn oficirojn, posedantajn sekretan mapon kun markita loko de la Hitlera stabejo.

Ankaŭ de Kuznecov la soveta komandantaro ricevis informon pri tio, ke unu el la spertaj faŝistaj sekretagentoj preparas sin por efektivigi specialan taskon en Irano. La informo estis ricevita antaŭ la Teherana konferenco kun partopreno de Stalin, Roosevelt, Churchill. Krome estis ankaŭ ĉiutaga laboro: kolektado de informoj pri translokiĝo de militaj trupoj; pri planoj kaj intencoj de Gestapo kaj SD; pri vojaĝoj de hitleraj ĉefoj kaj multaj aliaj informoj, kiuj sukcese estis uzataj en la batalo kontraŭ la malamiko.

La militspecialistoj opinias, ke ĉefaj eventoj dum la agado de Kuznecov en la malamika ariero estis ne palmortigo de naziestroj plenumitaj de li. Sed po-grajna kolektado de informoj necesaj al la soveta komandantaro. Ekzistas ankaŭ versio, ke kelkajn sekretajn informojn Kuznecov ricevis pere de germana oficiro-esperantisto, sed tiu supozo necesigas detalan esploron. Sverdlovskaj, Tjumenaj, Moskvaj kaj aliaj sovetaĵ esperantistoj daŭrigas la serĉado de materialoj pri la Esperanta agado de Nikolaj Ivanoviĉ Kuznecov.

A. KARVACKIJ,
USSR



MEMORE AL JULIO BAGHY (1891—1967)

Okaze de la 95-a datreveno de lia naskiĝo

*Kantu Baghy, nia bardo,
Bardo de l'sincera ardo,
Kun antaŭa fort':
Vian larman emociion
Kaj fajreran ironion
Aŭdos sud' kaj nord'!*

HILDA DRESEN, 1937)

„Li estis la plej multflanka ĉionfaranto de Esperanto: Li instruis, aktoris, reĝisoris, oratoris, varbis, redaktis Literaturan Mondon kaj super ĉio — verkis. Ĝenerale, ĉiu esperantisto nur amatoras nian movadon kiel flank-okupigon. Baghy oferis sian tutan vivon kaj tempon por Esperanto.“

SÁNDOR SZATHMÁRI

„Malantaŭ la poezio de Baghy staras la forta, viglega kaj aminda personeco de la poeto. Baghy ne turnis sin al la tradiciaj formoj, sed kreis siajn proprajn formojn, konforme al la inspiro, kiu en tiu momento plenis lin...“

Tiel longe kiel nia lingvo vivos — eĉ se la homoj de postaj jarcentoj kunportos ĝin al la aliaj planedoj kaj pli malproksimen — la poemoj de Baghy kaj Kalocsasaj estos legataj kaj amataj, kaj iliaj nomoj estos rememortaj. Kaj eĉ se nia lingvo morgaŭ jariĝus mortinta, eĉ tiam kelkaj belamantaj skolastikuloj legus tiujn poemojn; kaj ili sufiĉus por malhelpi la enterigon definitivan de nia lingvo, kiel la poetoj de Romo certigas la neforgeblon de la latina lingvo.

WILLIAM AULD,
(*Esperanta Antologio*, 1958, p. 16—19)

JULIO BAGHY

NE PLU MILITON!

Dum ardas la suno radiojn disperse
kaj fruktas abunde la arboj kaj hum',
jen profitavido sadisme perverse
preparas inferon kun kela mallum';
dum centmilionoj sin streĉas konstrui,
per vivo por vivo eĉ morton mem spitas,
ĉi bando kelkmila nur celas detrui,
kun blinda konscio pereon profitas.
Tondru respond' venkante mjnacon:
Ne plu militon! Pacon! Nur pacon!

Rigardu returnen! Sin levas fantome
jen multmillona — skeletoarme'.
Kriplulaj korpusoj, kadavroj duone,
sur stratoj demonstre sin trenas kun ve',
orbitoj per blinda, laringoj per muto,
homtorsoj per manko de membroj protestas,
la orfoj, vidvinoj pri vano de l'tuto
en hejmoj ruinaĵ proteste atestas.
Montras ĉi sortoj montran grimacon:
Ne plu militon! Pacon! Nur pacon!

Vivige brilegas la sun' horizonte,
nin nutras abunde la Teropatrino',
al ago ni povas freŝiĝi ĉefonte,
ĉerpante inspiron por homa destin'.
Je nomo de l'VIVO kun firma konkordo
sur kvin kontinentoj ni devas protesti,
frakasi fiplanojn, agentojn de l'MORTO
kaj novan epokon estigi kaj festi.
Gardu la Vivon, solan donacon!
Ne plu militon! Pacon! Nur pacon!

Rigardu antaŭen! Futuro nin vokas
por solvi problemojn en paco, liber';
la taskoj gigantaj prudenton provokas
por krei komunan patrujon el Ter'.
Gefratoj, en ĉiu popolo kaj lando,
ni vivu, laboru por savi la Homon!
Per kuna konstruo estiĝas la Grando
kaj levas tutmonde homon sur tronon.
Centmilionoj venkos minacon.
Ne plu militon! Pacon! Mondpacon!

JULIO BAGHY

AŬTUNA FOLIARO

Follaro, flirte danca,
en koloroj centnuanca,
prujnmordite ventpelate
ŝvebas ĉie: kampe, strate;
jen kuniĝas, jen dissaltas,
tie sinkas, tie haltas
por susuri, sible plendi,
jen funebre por silentj,
poste supren, ek pro blovo,
sed sencele kaj sen povo
ĝis ĝi ĉesas kirle krozi
kaj ariĝas por ripozi,
kuŝi kiel morta garbo
sub soleca seka arbo.

MIKAELO TERNAVSKIJ

MANETOJ

Mi estas strangulo,
ĉu vere?
Mi estas mem
surprizita.
El laboro
revenis
vespere
mi lacigita.
Kaj tuj
gaja
etulo
(kun miaj bluaj okuloj)
per la manetoj
kun petolo
kronis mian kolon.
Kiel al mi iĝis bone,
floreto mia!
Ho! Belega renkontiĝo.
La manetoj — malgrandaj tiaj, —
sed deprenas
la grandan
laciĝon.

enlanda movado

85 JAROJN E-MOVADO EN PLOVDIV



Partoprenantoj en la solenaĵo dediĉita al la 85-jara datreveno de la E-movado en Plovdiv.

La unua esperantista organizaĵo en Plovdiv estis E-klubo „Stelo“, fondita en 1901. Por celebri la 85-an datrevenon de la organizita esperantista movado en nia urbo la 16-an de aprilo j. k. en la salonode la Domo de Bulgara-Soveta Amikeco kunvenis pli ol 120 reprezentantoj de diversaj generacioj de plovdivaj esperantistoj kaj gastoj.

Pri la atingoj dum la forpasintaj 85 jaroj kaj pri la perspektivoj de la plovdiva E-movado rakontis la tuta programo de la solenaĵo. Reliefigis la plej gravajn momentojn la parolado de la prezidanto de DE de BEA Jordan Angelov, la interesa rakonto de la veterano Ivan Sivarov, kiu estiĝis 85-jara en 1986, la paroloj de Z. Bogdanova kaj F. Miĥajlova, kiuj gvidis la programon. La salutvortoj de E. Pejĉinova, reprezentantino de la juna generacio, estis ankaŭ promeso ne nur sekvi la plej bonajn tradiciojn, sed per entuziasmo kontribui por plua prospero de la E-movado.

Carmigis la ĉeestantojn la plej junaj esperantistoj — la infanoj, kiuj parolis kaj recitis en bona Esperanto.

Fani MIĤAJLOVA

MEMORE AL PENJO PENEV

La 18-an de majo 1986 la esperantistoj en Dimitrovgrad solene festis la 60-jaran datrevenon de naskiĝo de Penjo Penev — unu el la entuziasmaj konstruantoj kaj la talenta kaj fidela poeto de la unua socialisma urbo en Bulgario — la urbo de junularo Dimitrovgrad, konstruita antaŭ pli ol tridek jaroj sur nuda kampo, per la entuziasma libervola laboro de la bulgara junularo. La solenajon ĉeestis multaj gastoj el la distrikto de Haskovo. Tre interesa estis la raporto de Ivan Dobrikov pri la vivo de la poeto.

La publiko kore aplaudis la belartan programon preparitan de junpioniroj-esperantistoj el la urbaj lernejoj „Nikola Vapcarov“ kaj „Vasil Levski“, sub la gvidado de Slavka Boteva kaj Janka Koleva.

Fine la ĉeestantoj metis florojn antaŭ la monumentoj de Penjo Penev kaj d-ro L. L. Zamenhof.

Minka KAZAKOVA

KONFERENCO DE VEGETARANOJ

Okaze de la 100-jariĝo de Esperanto, la 11-an de majo 1986 en la Kulturdomo de kvartalo Proslav en Plovdiv estis organizita Konferenco de la Sekcio de Esperantistoj-Vegetaranoj ĉe BEA kaj de la societo de esperantistoj-vegetaranoj „Paco“ el kvartalo Proslav. La aranĝon ĉeestis Draguško Petrov, kiu salutis la partoprenantojn en la nomo de CE de BEA kaj la prezidanto de Plovdiva DE de BEA Jordan Angelov. Partoprenis pli ol 200 vegetaranoj — esperantistoj kaj estontaj esperantistoj.

La konferenca programo estis tre riĉa. Pri la 100-jariĝo de Esperanto raportis la sekretario de DE de BEA en Plovdiv Fani Miĥajlova. Verŝajne por unua fojo en la bela kinosalono en Proslav sonis la melodio Esperanto-parolo. La duan prelegon „Pri la senco de la homa vivo“ — faris Kubrat Tomov. Al la konferenco per raporto „Longvivado kaj sano“ kontribuis Lidia Kovaĉeva.

Post la tagmeza ripozo estis projekciitaj du interesaj filmoj. La unua prezentis la vivon kaj verkadon de la fama bulgara prentisto Boris Georgiev kaj la dua rakontis pri la lastaj jaroj kaj tagoj de Lev Tolstoj — lasta verko de la eminenta sovetia reĝisoro Sergej Gerasimov.

Kiril PAMUKOV

POST DEK JAROJ



Partoprenantoj en la kurso, kune kun la prezidanto de DE de BEA en Haskovo Nikola Pilev (la unua maldekstre), la veterano-esperantisto Georgi Idakiev (la unua dekstre) kaj la kursgvidanto Penjo Stojanov (meze, kun okulvitroj).

Preskaŭ 10 jarojn la Esperanto-societo en urbo Ĥarmenli (distrikto de Haskovo) ne havis aktivan agadon. Laŭ decido de DE de BEA dum la lernojaro 1985/86 estis organizita E-kurso sub la gvidado de la vojaĝanta lektoro el Haskovo Penjo Stojanov.

En aprilo j. k. tiu ĉi kurso finiĝis sukcese. El ĉiuj 15 gekursanoj ekzamenigis 11, inter ili la perfektuloj: d-ro Dobrinka Nedjalkova, Georgi Lajkov kaj Stojan Iliev.

Dum la kurso per la helpo de esperantisto-veterano Georgi Idakiev ni ricevis salutojn el Riga, Tallin, Andreevka (USSR) kaj el Dombovar (Hungario). Tiamaniere ni kreis bonegajn kondiĉojn por komenci E-korespondadon. La gekursanoj sendis kolektivan respondon al ĉiuj salutintoj, kaj esprimis sian dankon al niaj geamikoj el alilando.

Ni dankas al Antoaneta Stoeva, direktorino de lernejo „Ivan Vazov“ en Harmanli, pro la farita helpo, al ŝia koleginino la instruistino Diana Zajčeva al la kurso kaj al k-do Delčo Aleksandrov-kasisto de la societo, kiu multe prizorgis kaj ĉiutage faris ion necesan por la sukcesa laboro de la kurso. Tiamaniere ili helpis la elkreskon de novaj junaj esperantistoj, kiuj komencis aktivan esperantan vivon.

Estas rimarkinde, ke ĉiuj gekursanoj fariĝis regulaj membroj de la loka societo, kaj komencis partopreni en la organizita „Parolada rondo“.

Bonan vojon, junaj geesperantistoj!

Penjo STOJANOV



Lernejana E-kurso en Godeĉ kun gvidantino Maria Angelakova

ESPERANTO EN GODEĈ

Esperanto jam delonge estas populara en urbo Godeĉ, distrikto de Sofio. En 1969 tie estis organizita Internacia E-kurso sub la gvidado de prof. István Szerdahelyi el Hungario. De tiam unu el la urbaj plaĵoj portas la nomon „Esperanto“.

Jam kelkajn jarojn lokaj lernantoj fakultative lernas Esperanton. Ili korespondas kun samaĝuloj el USSR, Hungario, Pollando, Ĉinio, Japanio, regule partoprenas la distriktajn vintrajn E-tendarojn, gajnis premiojn dum la XVIII kaj XIX revuoj de E-parolo kaj kanto.

Dum la lasta lernojarro Esperanton oni instruis ne nur en la urba lernejo. Funkciis ankaŭ kurso por civitanoj, kiuj pere de Esperanto trovis novajn amikojn el Kubo, USSR, Hungario, GDR.

Lige kun la 100-jariĝo de Esperanto la societo „Fenestro al la mondo“ en Godeĉ aktive laboras kaj gajnas novajn adeptojn.

Maria ANGELAKOVA

HELPO PETATA!

Por pli sukcesa disvastigo de la E-movado, la esperantistoj en Nikaragvo bezonas helpon: lernolibrojn kaj lernilojn, librojn, gazetojn ktp.

Via helpo estos esprimo de amikeco kaj solidareco kun la nikaragva popolo.

Sendajojn adresu al: Nikaragva Esperanto-Asocio, Aptdo. 3912, MANAGUA.

VIRINA ARANGO



Partoprenantinoj en la virina renkontiĝo.

La 17-an kaj 18-an de majo j. k. en Burgas okazis konferenco organizita de la Virina Komisiono ĉe BEA kaj de la Distrikta Estraro de BEA en Burgas. Partoprenis 30 virinoj-aktivulinaj de la komisiono, reprezentantinoj de la distrikta estraro kaj gastoj. Dank' al la bona organizado, la konferenco estis fruktodona kaj agrabla.

La 17-an de majo la partoprenantoj forveturis al Grudovo — ĉefurbo de la Junulara Respubliko en Montaro Stranĝa Sakar. La grupon bonvenigis Katja Velkova, vicprezidantino de de la loka Esperanto-klubo „Ĉvjatko Radojnov“. Katja Velkova, Ivan Angelov — prezidanto de la Urba Komitato de Patrolanda Fronto kaj lokaj virinoj-neesperantistinoj rakontis pri la historio de Grudovo, pri la ekonomia kaj kultura disvolviĝo de la nuntempa urbo, pri la heroo batalo de la revoluciulo Todor Grudov, kies nomon nun ĝi portas.

Vanja Todorova, vicprezidantino de la Virina Komisiono, konigis al la ĉeestantoj la programon pri la antaŭstaranta celebrado de la 100-jara jubileo de Esperanto. Vasja Cvetkova, sekretario de la Komisiono kaj administra sekretario de Mondpaca Esperanto-Movado (MEM) parolis pri la aktiva partopreno de esperantistinoj en la batalo kontraŭ la vetarmado, pri siaj kontaktoj kun jarpanaj geesperantistoj dum ŝia vizito en Japanio.

La prezidantino de la Virina Komisiono — Belka Beleva, elokvente kaj atentokapte parolis pri la kontribuo de la bulgaraj esperantistinoj al la internacia Esperanto-movado.

La Virina Komisiono decidis preni sub sia aŭspicio societon „Cv. Radojnov“ en Grudovo.

Lernejana grupo el Pomorie kun gvidantino Smaragda Janeva plenumis artan programon „Esperanto-Bulgario“.

Inĝ. Vanja VANKOVA



DEZIRAS KORESPONDI

BELGIO

Ward Schallenbergh — B-2970 Boortmeerbeek, Jak Lemmensstr. 4 — dez. interŝanĝi bildkartojn pri popoldancoj, folklorokostumoj k. t. p.

BRITIO

John R. Wright (18-jara) — United Kingdom, Kent BR6 Opy, Orpington, 188 Court Road — pri lingvoj, vojaĝado kaj muziko, kolektas BK.

BULGARIO

Geesperantistoj el Razgrad deziras korespondi tm: Rusanka Radeva (37-jara) kaj ŝia filino Petja Radeva (15-jara lernantino) — Razgrad 7200, ul. „Baba Paraŝkeva“ 5 A — dez. amikan korespondadon.

Milena Georgieva (46-jara) — Razgrad, ul. „Dondukov“ 1, ap. 5.

Dobrinka Zagorova (26-jara) — Razgrad, j. k. „Orel“, gr. 7, vh. 3, ap. 11.

Tonja Stefanova (28-jara) — Razgrad, j. k. „Orel“, gr. 7, bl. P-5, ap. 6.

Kalinka Stojanova (18-jara) — Razgrad, „I. Vazov“ 38, ap. 33, vh. B.

Maria Manolova (58-jara) — Razgrad, ul. „Apŝeron“ 3

Petja Ivanova (18-jara) — Razgrad, EPJB-4, vh. B ap. 25

Antoaneta Dimitrova (18-jara) — Razgrad, ul. „G. Dimitrov“ 83

Antonija Popova (37-jara) — Razgrad, ul. „J. Covanov“ 7

Ivan Enev (29-jara) — Razgrad, j. k. „Orel“, gr. 7, vh. 6, ap. 18.

Ivelina Ivanova (19-jara) — Razgrad, „G. Dimitrov“, bl. EK-1, ap. 42.

Ceca Kolčakova (25-jara) — Razgrad, j. k. „Orel“, bl. 7, vh. 3, ap. 12.

Lilija Nikolova (29-jara) — Razgrad, EP B-7, vh. G, ap. 22

Gelernantoj el E-klubo „Verda Steleto“ — Razgrad 7200, ESPU „Hristo Botev“, E-klubo „Verda Steleto“ — serĉas amikajn kontaktojn.

ĈEĤOSLOVAKIO

Familio Stastny (22-jara instruisto en antaŭlernejo kaj 29-jara instruisto en elementa lernejo) — 67557 Rouchovany 196. — serĉas amikajn familiojn por korespondado kaj reciproka gastado.

HUNGARIO

Viktoria Szepesvân (10-jara) — H-6724, Szeged Ver-toi 3. VI/32 — dez. interŝanĝi PM. BK.

Mario Machlik (20-jara studento en Muzika Altlernejo) — H-7400 Kaposvar, Léva kôz 2. III./4. — kun gemuzikistoj.

Atilla Bagó (16-jara) — H-1081 Budapeŝto, Népszinház str. 38 — pri lingvoj, natursciencoj kaj turismo.

ENHAVO

*** DEPUTITOJ-AMIKOJ DE ESPERANTO	II
BOJAN LALOV. Esperanto en la epoko de komputerinstruado	1
BRENARD GOLDEN. Kio estas la ĝusta nomo de la planlingvo de d-ro Zamenhof?	3
MARIA JANKOVA. La kvara bulgaro-akademiano	4
DRAGUŠKO PETROV. Jubileo de IPTEA	5
MILENA GEORGIEVA, IVAN TERZIEV, M. TO-DOROVA. Esperanto en Razgrad-distrikto	5—6
CVETKA MITEVA. Bulgara-sveda kunlaborado	7
GEORGI MIHALKOV. La Esperanto-libroj en servo al la paco	8
JUNA ESPERANTISTO	9—10
HRISTO MANOLOV. Kara gasto el Belgio	10
EVGENI GEORGIEV. Mi diskonigos Bulgarian al Finnoj!	11
MARIN BĂCEV. Utiligu kroman tekston!	12
A. KARVACKIJ. Nikolaj Kuznecov — realaĵo kaj legendo	13
POEZIA PAGO	14
ENLANDA MOVADO	15—16
DEZIRAS KORESPONDI	III
DISTRA PAGO	IV

Sur la kovrilpaĝo:

Vidaĵo de la ĉarma Ropotamo-rivero.

Foto: Georgi Vikentiev

TEO JUNG|
(1892—1986)

La 13-an de majo forpasis Teo Jung, germano, la plej rekonata esperantista ĵurnalisto de la mondo. Inter 1917—1919 li eldonis monatan revuon **Progreso**. En 1920 li fondis la semajnan ĵurnalon **Esperanto Triumfonta**, kiu en 1925 ŝanĝis sian titolon je **Heroldo de Esperanto**. Teo Jung dum jardekoj redaktis tiun ĉi rekonatan internacian movadan revuon. Li skribis multnombrajn artikolojn, poemojn, skizojn, rakontojn en multaj E-revuoj, krome aperis kelkaj liaj libroj.

NI KONDOLENCAS

La 9-an de majo 1986 forpasis **PETĀR STEFANOV PETKOV** (77-jara) — prezidanto de E-societo „Mondamikeco“ en Ĉirpan. Li estis unu el la fondintoj de la societo kaj en daŭro de pli ol 30 jaroj ĝia konstanta prezidanto. Esperantisto jam de junaĝo. P. Petkov multe kontribuis por la evoluo de Esperanto ne nur en Ĉirpan, sed ankaŭ en la distrikto de Stara Zagora. Sindona batalanto kontraŭ la faŝismo. li ĉiam estis fidela al la nobla esperantista ideo por paco kaj frateco inter la popoloj.

Niajn sincerajn kondolencojn al la funebranta familio.

Cefredaktoro: Donĉo HITROV

Redaktoroj: Haim LEVI (vicĉefredaktoro), Lidia RAEVA (lingva redaktoro), Maria JANKOVA

Redakta komitato: Marin BĂCEV, Mariana ELENOVA, Dimităr HAGIEV, Krăstju KARUCIN, Georgi MIHALKOV, Venelin MITEV, prof. d-ro Kiril POPOV

Teknika arango: Ljubomir LAZAROV

Korektisto: Jordan ĈALJOVSKI

Administranto: Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:
„BULGARA ESPERANTISTO“
Bul. Hristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66
1 000 Sofio

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

distroj

ANEKDOTOJ

- Per kio vi vivtenas vin?
 — Per la plumo.
 — Ĉu vi skribas?
 — Jes, al mia patro, kiam mi bezonas monon!...

Detektivo revenas hejmen post laboro. Lia filo, kiu televidas medicinan filmon, demandas lin:
 — Paĉio, kial la ĥirurgo surhavas gumgantojn dum la operacio?
 — Por ne postlasi siajn fingropremsignojn!...

- Paĉjo, ĉu ankaŭ azenoj edziĝas?
 — Nur azenoj, mia filo!...

Okazas la unua kverelo inter junaj geedzoj.

Ŝi: — Mi reiros al mia patrino!

Li: — Iru, iru do!

Ŝi: — Sed mi revenos kune kun ŝi!

Direktoro al la oficisto: — bonvolu ne ĉirkaŭflirti mian sekretariinon, se vi volas eviti skandalon!

— Sed kial? Mia edzino tute ne estas jaluza!

— Sed mi ja estas!

Ŝi: — Antaŭ la geedziĝo vi promesis, ke vi plenumos eĉ miajn plej etajn dezirojn!

Li: — Sed viaj deziroj estas nur grandaj!...

La edzo tenas enmane ĵus ricevitan nigre randumitan koverton, kaj diras:


— Ve! Mia onklo mortis!

— De kie vi scias? Ja vi ankoraŭ ne malfermis la koverton!

— Sed mi rekonis lian manskribon sur la koverto!...

— Ĉu vi kredas, ke estas fatale edziĝi vendrede?

— Kompreneble! Kial vendredo farus escepton?!




61
81

Laŭ la glora vojo de la historio!...


Aŭtoro: Boris Dimovski

Krucvortenigmoj


(EN AMBAŬ DIREKTOJ!)



A-Bronza sonorigilo. B-Eldiri orakolon. C-Speco de okulvitroj. Ĉ-Rolo, ofico, tasko. D-Ĉefurbo de Italujo. E-Aparato. F-Virsekso pronomo. G-Finaĵo de substantivoj.



A-Malhelpas, blokas. B-Centro de cirko. C-Regno-estran. Ĉ-Anseroforma birdo. D-Aervibradoj.



A-Hommanganto. B-Simila al io malsamspeca, adekvata, konforma. C-Naza parolsono. Ĉ-Aparataro. D-Stato de 100-grada akvo. E-Faro. F-Difina artikolo. G-Mallongigi de „Oriento“.

Aŭtoro: Stano MARČEK, ĈSSR